

Bulgara **ESPERANTISTO**



1966

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. Granda epokfaranta evento (At. Lakov)	
K. Kolev. Du leĝoj	3
M. Garev. Kara memoro	4
Ĥr. Smirnenski. Ruĝaj eskadronoj	6
Popola kanto. Sirma vojevodo	6
N. Zidarov. Super Vjetnamio	7
D. Kolker. Ĉarma Primorsko	7
P. Stoev. Sentoj de veterano	7

JUNA ESPERANTISTO

B. Leonov. I-a Internacia Esperanto-labobrigado en Bulgario	8
M. Ševĉenko. El Siberio	9
Falangio. Vojaĝu — kaj vi multon povas rakonti	10

ORGANIZA VIVO

J. Kalinov, Coĉo Kolarov, L. Jalâmov, Iv. Zahariev, St. Darĵonov, K. Limonov	12
--	----

Kovrilpaĝo: La monumento de Vladislav III Varnenĉik, pola kaj hungara reĝo, pereinta en 1444 en batalo kontraŭ la turkoj apud Varna.

Abonkotizo: jara — 1,40 levo¹, duonjara — 0,70 lv. Pov eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1600 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamatarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigata senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16

NEDERLANDO: Ru Bössong, Floraplejn 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bucuresti 5.

SOVET-UNOI: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B.—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 10—a.



GRANDA EPOKFARANTA EVENTO

Je la sepa de novembro la soveta popolo, la popoloj de la socialismaj landoj, la laboruloj de ĉiuj partoj de la mondo, la tuta progresema homaro celebras la 49-an datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

La revoluciaj frapoj de la Granda Oktobro skuis la fundamentojn de la kapitalisma mondo. En la bataloj de Oktobro naskiĝis la nekonata ĝis tiam laborist-kamparana ŝtato — la Unuiĝo de la Sovetaj Socialismaj Respublikoj, kiu fariĝis potenca apogilo de la popoloj en ilia lukto kontraŭ la imperiismo, la koloniismo, kontraŭ ĉiuspeca nacia kaj socia subpremo.

La Oktobra Revolucio malkovris novan eraon en la historio de la homaro, stariginte la politikan superecon de la laborista klaso en la vastega rusa lando.

Nun al ĉiuj estas klare, ke la revolucia heroaĵo de la rusaj laboristoj kaj kamparanoj de Oktobro 1917 fariĝis inspiranta ekzemplo por la laborista klaso en la kapitalismaj landoj kaj por la popoloj en la koloniaj kaj dependaj landoj, aplikante konkrete la nevenkeblan instruon de markismo-leninismo.

Kia feliĉo por la homaro estis, ke en la mondo ekzistas Sovet-Unio. Tio precipe montriĝis dum kaj post la Dua Mondmilito. La venko de Sovet-Unio super la germana faŝismo kaj la japana imperiismo, ne nur savis la popolojn el la faŝisma jugo, sed radikale ŝanĝis la korelativcon de la fortoj en tutmonda skalo. Kreiĝis favora situacio por la sukceso de la socialisma revolucio en multaj landoj de Eŭropo kaj Azio, inkluzive ankaŭ en nia lando, kaj por la sukcesa konstruado de la socialismo.

Pere de la Oktobra Revolucio kaj per la helpo de Sovet-Unio formiĝis la monda socialisma komuneco — egalrajta alianco de sendependaj, suverenaj socialismaj ŝtatoj. Ĝia apero estas la plej granda evento post la venko de la socialisma revolucio en Rusio.

La kreiĝinta socialisma komuneco sur la principoj de la proleta, socialisma internaciismo, de la ĉiuflanka kamaradeca kunlaboro kaj frata interhelpo fariĝis grandega faktoro por starigo en la mondo de daŭra paco kaj paca kunekzistado.

Ĉu nun ni povus prezenti al ni la konservon de la monda paco, la sukcesan konstruadon de la socialismo en pluraj landoj, la sukcesplenan batalon kaj la liberigan movadon en la koloniaj kaj dependaj landoj, la aperon de multaj sendependaj ŝtatoj en Afriko kaj aliaj partoj de la mondo dum la lastaj jaroj, la sukcesan batalon de la laborista klaso en la kapitalismaj landoj por pli bona vivo, demokratio kaj socialismo, sen Sovet-Unio, sen la landoj de la monda socialisma sistemo, sen la epokfaranta instruo de markismo-leninismo?

Ne, tion ni ne povus prezenti al ni. La malon povus aserti nur homoj, kiuj havas nenion komunan kun la reala vivo, kiuj estas kontraŭuloj de la homa progreso kaj la paco en la mondo.

Nia popolo kun aparta ĝojo kaj dankemo celebras la 49-an datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revoluto, des pli, ĉar nur unu semajno post tiu celebrado okazas la Naa Kongreso de Bulgara Komunista Partio, kiu akceptos la projektodirektivojn pri kvinjara plano por la disvolvigo de la popola ekonomio de la lando dum la periodo 1966—1970. Ĉar la ĉefa ekonomia politika tasko estas la garantio de la plua sukcesa konstruado de la socialisma socio en Popola Respubliko laŭ la vojo de la rapida konstruo de la materiala teknika bazo de la socialismo, pliperfektigo de la socialismaj sociaj interrilatoj, la plibonigo de la vivnivelo de nia popolo.

La bulgaraj esperantistoj kun granda entuziasmo partoprenas en la celebrado de la 49-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj samtempe streĉas ĉiujn siajn fortojn por la plenumo de la direktivoj, kiuj estas grava bazo por la finkonstruo de nia paco kaj feliĉa vivo.

LA BULGARA MINISTERIO DE EKSTERAJ
AFEROJ SALUTAS 51-an UK

МИНИСТЕРСТВОТО НА ВЪНШНИТЕ РА-
БОТИ НА НР БЪЛГАРИЯ ПОЗДРАВЯВА
51-ия UK

Estimataj kongresanoj,

Уважаеми конгресисти,

Dankante al LKK por la afabla invitletero, kiun ĝi direktis al la Ministerio de eksteraj aferoj de Popola Respubliko Bulgario, mi je la nomo kaj laŭ la komisiono de la ministro Ivan Baŝev kore salutas la kongreson kaj deziras al vi ĉiuj utilan kaj sukcesan laboron.

Esperante ke tiu ĉi kongreso estas nova paŝo al plua firmigo de la kulturaj kontaktoj inter la popoloj en intereso de la paco kaj la amikeco inter ŝtatoj kun malsama sociordo, mi utiligas la okazon solidariĝi kun la althumanaj kaj noblaj ideoj de la esperantista movado je servo al la tuta homaro.

Radi Botev

Unua sekretario pri kulturaj
problemoj de la ambasadorejo
de Popola Respubliko Bulgario
en Budapeŝto

Отзовавайки се на любезната покана, изпратена от Организационния комитет на вашия конгрес, от името и по поръчение на Министъра на външните работи на Народна Република България Иван Башев, ви приветствувам най-сърдечно и пожелавам на всички вас ползотворна и успешна работа.

Надявайки се, че и този конгрес е нова стъпка за по-нататъшното разширяване културните контакти между народите в интерес на мира и дружбата между държавите с различен обществен строй, ползувам се от случая още един път да се солидаризирам с високохуманните и благородни идеи на есперантското движение в служба на цялото човечество.

Ради Ботев

Първи секретар по културните въпроси при Посолството на НР България в Будапешта



DU LEĜOJ

de K. Kolev

En la kupeon eniris virino, kun kapo vualita per granda nigra tuko. Ŝia tuta vizaĝo estis ĉizita per multaj profundaj sulkoj, ĉirkaŭantaj du kavajn malhelajn okulojn. Okulojn de patrino. Surbruste de ŝia trikita lana veŝto pendis ordeno — signo, ke dum la popola batalo ŝi donis pecon de sia koro mem. La plej karan, kiun ŝi posedis.

La trajno rapide ekglitis tra la ebenaĵo. La virino, anhelante pro laciĝo, ripozinte iom sur la benko, komencis reakiri la spiron, sed ŝiaj okuloj konstante fiksitis sin al la fenestro.

— Filo, ĉu ni ne preterpasis jam la fervojstacion Skutare? — demandis la maljunulino kaj ĵetis maltrankvilan rigardon al la sidanta ĉe la angulo homo en uniformo de fervojisto.

— Ĉu pri Skutare vi demandas? — li subite saltleviĝis. — Sed la trajno estante rapida ne haltas tie ĉi.

Surprizite, la patrino komencis langoklaketi bedaŭre kaj ahis kaj ojis ĉemociite. Leviĝinte de sur la benko, ŝi, ekstaris ĉe la pordon de la kupeo, hezitante kaj ne sciante kion fari. Sed kiamaniere oni povus helpi al la povra virino? En la sama momento, antaŭ ni aperis subite la alta, impona figuro de biletkontrolisto el la fervoja administracio de Plovdiv.

— Filo, mi preterlasis Skutare! Ĉu iel mi povus reiri tien?

Severa, senindulga voĉo tuj vipis nin ĉiujn sur la vizaĝon:

— Vi ja estas pasaĝero sen bileto. Pagu tuj punmonon kaj mi elvagonigos vin ĉe la sekvonta fervojstacio. . .

Mirkonstrante, si levis la okulojn al li, montris la kartonbileteton kaj diris humile:

— Al Skutare mi veturas, jen estas mia bileto. . .

— Tio tute ne gravas por mi. . . Elvagonigu vin tuj. He, konduktoro,

skribu al ŝi kvitancon pri la monpuno!

Aŭdinte tion, ĉiuj pasaĝeroj indignis kaj ekprotestis. La vestita en peltjaketo pasaĝero en uniformo de fervojisto, kiu sidis ĝis tiu momento ĉe la angulo, subite saltleviĝis energie kaj ekstaris inter la patrino kaj la kontrolisto:

— Vi ne tuŝu la virinon, he! Ĉu estas klare al vi?

— Atentu pri via konduto, mi ja plenumas mian oficdevon, mi procedas laŭleĝe. . .

— En la vivo ekzistas ankaŭ aliaj leĝoj. Ĉu vi estas blinda, ĉu vi ne vidas kia virino staras antaŭ vi?

La severa ĉefo demandis lin pri lia nomo, por poste postuli de li respondecon.

— Oni nomas min Ziso Cvetanski, lokomotiva maŝinisto el la fervojvagono de Plovdiv, ĉu vi ne rekonis min, he?

Ĉe la sekvanta haltejo la juna homo helpis al la patrino por elvagoniĝi, kondukis ŝin ĉe la ĉefon de la stacidomo kaj insistis antaŭ li kategorie:

— Tiun ĉi maljunan virinon vi sendos al Skutare per la sekvonta trajno aŭ per la ofica motorvagono. Sen bileto vi sendos ŝin. Kaj se vi pretendas, mi pagos al vi koston de ŝia bileto. Sed vi ankaŭ ne forgesu, ke ŝi pagis por ni ĉiuj, veturantaj per la trajnoj. . . Ĉu estas klare?

Malgraŭ ke longa tempo jam pasis de post tiu incidento, la amara sento de ofendo ankoraŭ restas en mi kaj en la koroj de la ceteraj pasaĝeroj. Ĉar ne estis ĉagrenita nur iu patrino, sed oni impertinente profanis la leĝon de humaneco. Dum unu el la homoj diris fieresian nomon laŭte, la alia — la kontrolisto, rifuzis eĉ legitimi sin. Ni vane serĉis lin poste. Tamen li mem devas nepre elserĉi la maljunan patrinon kaj respekte kisi al ŝi la manon.

Preskaŭ pasas tri jaroj de la terura momento 05,14 h., 26-a de julio 1963, kiu disportis en la mondo la nomon de nia, tiam peze vundita, urbo. Se ni trafolumus la gazetojn post la tertremo, ni legus pri heroeco de homoj, de ordinaraj homoj. Sed sufiĉe multo estas skribita pri la tertremo, pri la solidareco, nun mi volus skribi pri io alia. Mi volas skribi pri gimnazio „Georgi Dimitrov“, donaco de via popolo al nia tiam preskaŭ ruinigita urbo. Ne pensu, ke ĝi estas bela, tute kontraŭe, ĝi estas belega, moderna, hela, vasta, bonege ekipita per lernejoj ilaroj. Unu detalo: mia filino lernas tie.

Mi ne skribos pri la tute novaj modernaj urbopartoj, kun larĝaj stratoj. Mi ne skribos pri la meksikaj domoj, kolorigitaj per helaj koloroj de malproksima Meksikio, aŭ pri la akraj tegmentoj de la domoj el Aŭstrio, pri la grandega fabriko de domegoj (ĝin ni skopjanoj populare nomas:

— rusa fabriko, donaco de USSR. Pli ĝuste mi skribos pri nomo. La nomo, kiu vekis ĉe mi rememoron pri la pasinteco.

La nomo mem parolas multon. Sed Georgi Dimitrov ne estas nur via, li apartenas al la tuta progresema homaro.

Facile estas imagi la konsekvencojn de lia heroa defendo antaŭ la faŝista tribunalo, por unu makedona ne granda urbo, en kiu mi loĝis antaŭ la Dua Mondmilito.

La faŝista reakcia reĝa reĝimo nacie subpremis la makedonan popolon, ekonomie ekspluatadis ĝin, kaj granda parto de la loĝantaro vivetis de tago al tago. Ekzistis multe da senlaboruloj. La tiamaj gvidantoj kaj la homoj ĉirkaŭ ili estis riĉuloj, malsaĝaj kaj morale tre suspektindaj. De tempo al tempo oni mallaŭte parolis de buŝo al orelo pri iu fiago nemorala aŭ malho-

nesta de iu grandulo, kiu havis „en sia poŝo“ la tutan urbon. Kvankam la tiam gazetararo ne estis libera, la veron pri faŝismo ne estis eble kaŝi.

Subite la nomo de Georgi Dimitrov enflugis en niajn korojn. Subite lia nomo fariĝis tre menciata. Eĉ la sataj, ne sufiĉe inteligentaj eturbanoj kun respekto profunda parolis pri Dimitrov. La tranĉaĵoj de la tiamaj gazetoj, en kiuj oni skribis pri la Lejpciga proceso, estis nia plej ŝatata legaĵo, kaj ili falditaj iris de poŝo al poŝo. Ni progresemaj gejunuloj multe lernis de Georgi Dimitrov. Lia senprecedenca heroaĵo, lia duelo kun la tiam dua homo en faŝista Germanio, Göring, donis al ni multe da interna vero por batalo kaj por venko. . .

En la fino de 1933-a ni streĉe atendis la finon de tiu juĝa komedio en Lejpcigo. Kaj al ni ĉiuj la sciigo, ke Dimitrov, Tanev kaj Popov forflugis per soveta aviadilo al Moskvo, kaŭzis feliĉon, ĉar ili tri estis tiamaniere savitaj el ungegoj de abomenaj faŝistoj. . .

Dum la malfacilaj militaj jaroj mi vivis kaj laboris kiel seruristo en fabriko en Sofio. Ne estis eble ne viziti la patrinon de Georgi Dimitrov, ne viziti lian hejmon, vidi la lokon, kie li laboris, kvankam la vizito mem en tiu tempo estis danĝera.

En la komenco de 1942-a mi kun la tiam lernantino de gimnazio Nedelka Kojuharova decidis viziti la domon, en kiu vivis avino Paraskeva, patrino de Georgi Dimitrov. Nedelka trovis la adreson, sed ekzistis du demandoj. Trovi oportunan respondon, se policanoj kontrolus niajn legitimilojn kaj demandus nin, kion ni serĉas en tiu „danĝera domo“, kaj due, ĉu la patrino de Georgi Dimitrov, avino Paraskeva, volas akcepti nin kaj interparoli kun ni.



Ambaŭ problemoj estis feliĉe solvitaj.

Kelkajn tagojn antaŭ la vizito ni „trastudis“ la straton, kie troviĝas la domo de Dimitrov. Due, ni elpensis rakonton pri nia interkonatiĝo, ĉar mi estis simpla laboristo el Makedonio kaj Nedelka lernantino, naskita en Norda Bulgario.

Mi kun Nedelka kuraĝe eniris la pordon de la domo, kvankam iomete embarasitaj. Ni komencis paroli singene, sed tio estis nur en la komenco. Post ĉirkaŭ 10 minutoj ni estis kvazaŭ malnovaj konatoj, kvazaŭ parencoj, dank' al avino Paraskeva. Niaj timoj, ke ŝi povas esti nur oficiala, malkomunikema kaj ke nia tiom dezirata renkontiĝo povas finiĝi per du-tri ĝeneralaj frazoj en la korto aŭ en la koridoro de la domo ne efektiviĝis.

Avino Paraskeva flue rakontis pri sia filo Georgi, patrine rigardante nin per siaj mildaj okuloj. Ŝi eĉ montris al ni multe da fotoj. Mi memoras, ke kelkal fotoj prezentis Georgi Dimitrov, kiam li estis juna, kaj unu prezentis avinon Paraskeva ĉirkaŭitan de multaj gejunuloj el Francio.

Tre vive ŝi rakontis al ni okazintaĵon, kiu estis nelonge antaŭ nia vizito. Multe da tempo ŝi ne ricevis leteron de Georgi. Estis malfacila tempo, fino de

1941-a, la faŝista boto komencis treti la teron de Sovetoj. Kompreneble estas, ke avino Paraskeva maltrankviliĝis pri sia filo.

— Ne povas esti, li estas tiom akurata, sed fiuloj ne donas al mi la leterojn alvenintajn el Moskvo — konvinkis nin avino Paraskeva.

Kaj ŝi decidis iri al la tiama „tre danĝera loko“ en Sofio, al la Soveta Legacio. La kamaradoj el la legacio tre bone akceptis ŝin, oni regalis ŝin kaj diris, ke Georgi troviĝas en Kujbiŝev.

Kompreneble, tiu vizito ne povis resti kaŝita. Kaj ŝi preskaŭ tuj „pagis“ la viziton en la Soveta Legacio per unu devigita vizito, sed en tiu okazo en efektive danĝera loko — en la Direkcio de Polico.

Ironie avino Paraskeva rakontis al ni pri tiu renkonto kun la policianoj pri iliaj stultaj demandoj.

Nia tiom dezirata vizito finiĝis, avino Paraskeva afable akompanis nin ĝis la pordo, same kiel parencojn.

Mi kun Nedelka rapidis tra la sofiaj stratoj, vere tre kontentaj de la vizito. Ŝajnis al ni, ke ni estis gajnintoj de la plej granda premio de la loterio...

Metodi Garev, Skopje

FERVOJISTOJ ABSTINENCULOJ KONGRESOS EN FINNLANDO

En urbo Järvenpää (Finnlando) okazos dum 12—20. VI. 1967 Kongreso de IEAV (Internacia Fervojista Kontraŭalkohola Asocio).

Speciala programo estos planita por junuloj. Inter aliaj aranĝoj ni kunvenigos la Esperantan Rondon de Abstinaj Fervojistoj, kun propra programo. Post la kongresfino ni aranĝos rondvojaĝojn ĝis Laplando, kaj laŭ deziro grupvojaĝojn al Tallinn, la interesa ĉe-

furbo de Estona Soveta Respubliko aŭ al bela Leningrado.

Ni atendas abundan partoprenon de Esperanto-spertuloj, por montri en praktiko la avantaĝojn de la Internacia Lingvo ĉe interrilatado de diverslandaj fervojistoj.

Demandojn pri pli detalaj informoj bonvolu direkti al la prezidanto de Finnlanda Federacio de Abstinaj Fervojistoj, s-ro Matti Voltti, Temppelikatu 25 n-ro 47, Helsinko 10.

RUĜAJ ESKADRONOJ

de Hristo Smirnenski

En maten' de helepoko per la torĉ' de nova voko
venas viglaj eskadronoj kun impeto al la cel',
kaj samkiel rabaj birdoj kiel ar' da agloj hirtaj
super ilin tondron ŝutas ja ŝrapnelo post ŝrapnel'.

Jen ĉeval' stariĝas, henas, fortojn konsuminte svenas
kaj surteren falas iu mortpafita batalant'.
Haltas la ĉeval' momente, sed ekflugas kiel vento
kaj atingas la taĉmenton de l' impeta kavalkad'.

Kaj flirtante per kolharoj tra l' falĉitaj grenkamparoj,
kiel ŝtormo forpasadas eskadron' post eskadron'.
Kaj aperas sub la hufo polvo kiel grizaj nuboj
vualante la rebrilon de la fajra horizont'.

Tie ĉi post la salikoj eĥis pafoj malamikaj
kaj la flamaj ondoj fajraj brust' ĉe brust' renkontis sin,
furiozas ŝtorm' alarma kaj ektintas tal' malvarma
kunpuŝiĝ' kaj l' eskadronoj flugas al la malproksim'.

Flugu, flugu eskadronoj! Vin observas milionoj
da rigardoj alfiksitaj per espero kaj per am'.
Kaj ŝvinginte pugnon feran tuta mondo sin oferas
kortuŝite kaj ravite de la venka via fam'.

En surprizo kaj detruo ruiniĝu la konstruo
de l' malvero monda s'ue, de la sufokita kri'
kaj la homo en konkordo post la malfermita pordo
trovu la himerojn mortaj de la leĝo sen anim'.

Flugu, flugu inter flamo kaj mitrala fajrornamo,
vi — profetoj de la amo kaj sennuba tag' en mond'!
Per tempesto, fulm' kaj bruo vi anoncu marŝon pluan
de la ribelintaj sklavo, de la granda ruĝa ond'!

Kaj la lasta ŝtono de la envolvita en flam' hela
kaj en rubo — prakastelo kiam falos en ruin'
de l' ĉevaloj vi desaltu kaj la teron kisi haltu
kaj starigu en la mondon daŭran amon ĉe la fin'!

1920

El la bulgara: At. Lakov

SIRMA VOJEVODO

Popola kanto

Junuloj diris al Sirma:
— Ĉu oni vidis, ĉu aŭdis
knabino esti gvidanto
de sepdek junaj bravuloj
en tiuj verdaj arbaroj,
ĉe tiuj akvoj malvarmaj! —
Sirma al ili parolis:
— Bravuloj, karaj sindonaj,
je fago ringon vi ligu,
per kuglo ringon ekcelu.
Kaj kiu trafos la ringon,
estiĝos nia gvidanto! —
Ĉiuj laŭvice ekpafis,
la ringon trafis neniu.

Alpaŝis Sirma kaj diris:
— Al mi pafilon vi donu! —
Sirma al ringo ja pafis.
La ringo falis de l' fago.
Sirma al trupo parolis:
— Kaj nun per ŝtono vi ĵetu!
Se superĵetos min iu,
li estos juna gvidanto! —
Ĉiuj laŭvice ĵetadis.
Kunulojn Sirma superis.
Kaj iĝis Sirma vojevodo
de sepdek junaj bravuloj.
El la bulgara tradukis:
Zefira Dimitrova



SUPER VJETNAMIO

DE NIKOLAJ ZIDAROV

Ne brilas
super Vjetnamio
la luno kiel suda frukt' —
la luno kun soldata kasko
postenas sur ĉiel'
en lukt'.
En rizokampoj
krias birdo;
ĝemadas tago, plendas pluv';
soldatoj malamikaj pafas
infanojn, revojn,
ventojn plu.
Sed konscienc'
bruligas ili
ĝangalojn kaj rizkampojn mil,
kaj nokte nigraj eskadretoj
faligas stelojn
per flugil'.
Sur vasta horizont'
aŭroro
senstelan nokton pelas for;
kiel vulkano tiu lando
boladas
kun heroa kor'.
La sturmon malamikan
baras
akvaro, tero kaj aer';
de sang', de pluvoj konsumiĝas
ĉemizo, penso
kaj leter' . . .
Ho malamik',
trovinta vojon
per ŝip' kaj per flugil' al ni —
de Vjetnamio al Usono
neniam plu reiros vi.
Tradukis Asen Grigorov

ĈARMA PRIMORSKO

de Daniel Kolker

Aliuj revis ĉen pri Moskvo,
jen pri Londono, pri Pariz'. . .
Sed mi ekrevis pri Primorsko,
ho Dio — benu min per viz'.
Ĉu ne di' - beno estu vizo
se tie, en balkana land'
okazus vera paradizo
por mi, por ĉiu sun-amant'.
Sud tiuj tendoj aŭdmaraj,
en ĉi-angul' de l' kontinent'
atendas min geknaboj karaj
plenplenaj je amika sent'.
Kaj tie ĵuros ni por paco
streĉante fortojn por batal',
ĉar bone gvidas nin kompasoj
kun verda stel' sur sia skal'.
Kaj sciuj vi, turmentistino,
ke eble sur tiea strand —
aperos tuj el boska sino
fein' belega kvazaŭ kant'.
Ŝi estos sam-miniatura
kaj nigrokula kiel vi,
sed je anim' — pliege pura!
ne hipokrita! Sen envi'! . . .
Kaj ni renkontos vid'al vide
julian sunon de Feliĉ'. . .
Komunan lingvon tre rapide
ektrovos ni en grota niĉ'. . .
Nur unusola tradukisto
necesos por konfesa vort'
ĉi tio estos arda kiso
de ĉio bela — fin-agord'.
Aliuj revas jen pri Moskvo,
jen pri Londono, pri Pariz'. . .
Sed mi ekrevis pri Primorsko,
ho Dio benu min per viz'! . . .

SENTOJ DE VETERANO

de Penko Stoev

Forpasis multaj jaroj de laboro,
de streboj, ĝojo kaj ĉagreno
kaj rememoras mi pri Antverpeno, —
pri la kongreso Sepa karmemora.

Junul' mi estis tiam, tute sola
bulgaro inter gastoj el tutmondo —
esperantist' revanta pri l' estonto,
de pac' kaj am' fidela apostolo.

La vivo ofte min ĵaluze premis
kaj baris mian vojon esperantan,
sed spitis mi obstine laborante
kaj la sukcesoj en la fino venis.

Denove mi, maljuna veterano,
dum la kongreso Kvardek-kvara
en Varsovio Zamenhofa kara —
kun ĝojo mi tralegis la sloganon:

„Pro nia vivo kaj labor' peniga
kaj la batal' senĉesa, esperanta
abundajn fruktojn ĝuu ni, konstante
kreskadu de la Lingvo la apliko!“

Kaj tial mi kun ĝojo kaj kontento
al la estont' por la laboro paca
kun l' junularo vigla kaj senlaca,
konkorde marŝas kun junula sento.

Plovdiv, 1966

JUNA ESPERANTISTO

I-a INTERNACIA ESPERANTO-LABORBRIGADO EN BULGARIO (1—22. VII. 1966)

Multjara estas la historio de la brigadmovado en nia lando. Kiel imponaj monumentoj de tiu movado estas multaj konstruaĵoj kiel „Trapasejo de la Haimboaz“, fervojlinioj Pernik—Volujak kaj Ljaskovec—Zlatarica, baraĵlago „Al. Stambolijski“, la urbo de la juneco Dimitrovgrad kaj aliaj.


La junaj esperantistoj ne restis fremdaj al tiu ĉi movado. La pasintan jaron pli ol 100 gejunuloj partoprenis en la I-a Nacia Esperanto-Laborbrigado. Ili en daŭro de unu monato laboris por la konstruado de la panorama vojo en Vitoŝa-monto.

Pro la granda intereso en eksterlando al nia junulara brigado, la Estraro de BEJ decidis ĉi-jare ke la brigado estu internacia. Respondante al la tutlanda alvoko por konstruado de la historia, antikva ĉefurbo Veliko Târnovo kiel historia, kultura kaj turisma centro, estis decidite, ke la brigado laboru tie! Kaj jen, je la 1-a de julio 1966 j. en la urbon venis ĉirkaŭ 150 junaj esperantistoj el la socialismaj landoj.

En kunsido de la Estraro oni distribuis la taskojn: ĉefkomandanto B. Leonov, vickomandantoj Marijana Jordanova kaj Gatju Gatev, komandanto G. Gârbaĉev, respondeculoj pri la kulturklerigaj aferoj Ana Lukaŝevska (Pollando) kaj Todorka Tonĉeva, respondeculoj pri gazetaro kaj propagando Mirko Georgievski (Jugoslavio), pri sportaj aferoj Blagoj Blagoevski. La brigadanoj estis distribuitaj en 3 taĉmentoj kun taĉmentestroj Vasil Asenov, Petr Prilevka, Georgi Georgiev kaj 6

taĉmentgrupoj. Komenciĝis ĉiutaga konkurado inter la grupoj. Plej ofte „gruposuperulo“ estis la grupo de D. Ivanov. La laboro ne estis facila, tamen ĉiuj malfacilaĵoj estis venkitaj.

Interesa kaj gaja estis la vivo de la brigadanoj kaj en la koroj de ĉiuj restis neforgeseblaj rememoroj. Kun ĝojo oni povus konstati, ke la iniciatoj por interesigo kaj gajigo de la brigadivivo, ne venis nur el la kunsidoj de la Estraro, sed de la brigadanoj mem. Ekzemple amika estis la vivo en la



Partoprenintoj en la Laborbrigado

taĉmentgrupo de Emil Ĉirpanski — ĉiutage dum la granda ripozo kun granda intereso flanke de la brigadanoj estis atenditaj la „emisioj“ de radio „Internacia Rozo“, kies ĉefa redaktoro kaj iniciatinto estis la ĉefa studento Peter kaj liaj plej bonaj helpantoj — Aleksandr el Jugoslavio, Igos el USSR, Rihard el Ĉeĥoslovakio, Emil el Bulgario. Ĉiuj atente aŭskultis la ŝercajn reklamojn, kiuj kreis gajan atmosferon.

La gajemaj Mirko kaj Blago el Ju-

goslavio fondis la klubon „Kontraŭ-krokodilanoj“. Unue en ĝi partoprenis nur kelke da esperantistoj, sed poste preskaŭ ĉiu brigadano estis membro de la klubo.

Neforgeseblaj por la eksterlandanoj estis la senpaga ekskurso ĝis pinto Stoletoŭ. Ni vizitis la monumenton de la Libero, monaĥejojn apud Gabrovo kaj Drjanovo kaj la urbon Gabrovo. Interesa estis la neantaŭvidita en la plano rekontiĝo kun la mitropolito Stefan de Veliko Târnovo en la monaĥejo de Drjanovo. Eksciante, ke en la monaĥejo estas geesperantistoj el diversaj landoj, li venis ĉe nin kaj tre interese parolis pri la amikeco inter la popoloj, pri la mondpaca movado, emfazante ke ankaŭ „la lingvo de la amikeco Esperanto“ (kiel li diris) bone servas al la homoj por ilia amikiĝo. La renkontiĝo lasis profundajn impresojn en la koroj de la gejunuloj. En Gabrovo okazis renkontiĝo kun la lokaj esperantistoj, kiuj gastame akceptis kaj manĝigis nin en la novekonstruita restoracio „Kolibite“. Sciante la anekdotojn pri la gabrovanoj, pri ilia avareco, multaj el la eksterlandanoj miris pri tiu brila akcepto, gastamo, sed restis en la pasinteco la gloro de la malnovaj

gabrovanoj. Mi deziras profiti la okazon esprimi la koran dankon je la nomo de la Estraro de la Brigado al la esperantistoj en Gabrovo.

Interesaj estis la organizitaj „vesperoj de nacioj“. Tiuj vesperoj estis organizitaj por ĉiuj landoj reprezentitaj en la brigado. En tiuj vesperoj la junaj esperantistoj konatigis la ĉeestantojn kun la historio, vivo, kulturo, kantoj de siaj popoloj.

Ni laboris kaj vivis kune kun la brigadanoj de la studenta brigado ĉe la loka Supera Pedagogia Instituto. Ili ne estis esperantistoj, sed la komuna vivo faris ilin bonaj amikoj de Esperanto. Por ili estis organizita E-kurso kun lektoro B. Leonov.

La brigado klare montris antaŭ la loĝantaro, ke Esperanto estas la lingvo, kiu povas amikigi kaj unuigi la junulojn de la tuta mondo.

La Estraro de BĖJ estas certa, ke dum la venonta jaro, rezulte de la bona laboro de la brigado kaj la neforgeseblaj impresoj de ĉiuj eksaj brigadanoj, en la II-a Internacia E-Laborbrigado partoprenos pli multe da geamikoj el multe pli da landoj.

Boĵidar Leonov
ĉefkomandanto de la brigado

EL SIBERIO

Dum majo en Barnaul okazis la II-a Renkontiĝo de okcidentsiberiaj esperantistoj. Ĝin okazigis iniciatinto de tiuj Renkontiĝoj Barnaula E-Klubo.

Alvenis gastoj el Novosibirsk, Ust Kamenogorsk, Omsk, Bijsk, Rubcovka. Apenaŭ elvagoniĝinte ni ekaŭdis la voĉon de radioparolistino, juna samideanino Nelli Svolvolino, salutanta nin en Esperanto kaj informante kien ni devas direktiĝi. Ekde tiuj ĉi minutoj ĝis la forveturo — dum du tagoj — ni ĝuis atmosferon de amikeco kaj gastamo, kiujn prezentis al ni niaj barnaulaj amikoj.

Ĉiuj kune ni promenadis tra la urbo

kaj nova esperantistino Vera Rubelj interese rakontis al ni pri historio de multjarcentaj lignaj domoj, pri la klasikstila malnova centro.

De la vitrinoj de landstuda muzeo, kie ni pasigis kelkajn horojn, ekblovitis la freŝeco de la praaj arboj, abundaj je faŭno, tra kiuj sin direktis la ekspedicioj de Prjevalski, Semenov-Tjanj-Ŝanski, de akademiano Obruĉev — ni kvazaŭ aŭdas lian voĉon saluti nin en nia Esperanto.

Vere ĝoje trapasis ĉi-taga vespero kiam ĉiuj ni kolektiĝis ĉe la bankedtablo. Multis toasto, certe por Paco kaj Internacia Lingvo. Ĉi-vespere sonis en



Parto de la partoprenintoj en la renkontiĝo en Barnaul

Esperanto vigla amika parolo, versaĵoj, kantoj. Sekvintan tagon ĉirkaŭ kvardek gejunuloj alvenis komunan kunsidon en Domo de Instruistoj. Post saluta parolo de A. Gončarov salutis la renkontiĝon reprezentantoj de aliaj urboj. Dum la kunsido estis pridiskutitaj la demandoj pri sportinterŝanĝo, instrumentadoj kaj pri plifortigo de la ligoj inter junularaj grupoj. La kunsido substrekis gravan utilon de similaj renkontiĝoj por plivigligo de E-Movado en apartaj urboj. Post la kunsido fare de mastroj estis pre-

zentita malgranda koncerto. Specialan impreson elvokis ĥora kantado.

Aktivuloj dum aparta kunsido decidis organizi sian seminarion en la somero de la venonta jaro. Dum ripozhoroj estis vizitataj kinejo, bildgalerio, kafejo.

Veran bedaŭron ni sentis, kiam startis nia trajno kaj de ni komencis malproksimiĝi niaj verdstelaj diversurbaj geamikoj.

M. Ŝevčenko,
Ustj Kamenogorsk



E-ekspozicio aranĝita de la junulara klubo en Zaporojje, USSR.

VOJAĜU — KAJ VI MULTON POVAS RAKONTI!

Kutime mi mem kaj sola veturas al eksterlando kaj nur gvidas gastigantajn esperantistojn tra mia hejma urbo, famekonata. Ĉies nomon mi tamen volas diskrediti en tiu ĉi historieto same kiel la mian. En tiu urbo ankaŭ ekzistas turisma oficejo ĉe kiu mi dum certa tempo laboras. Do, mia laboro estas gvidi kontentige la eksterlandajn turistojn tra mia urbo kaj tra la hejmlando mia. Estas interesa sed kelktempe malfacila — nervojnraba okupo ĉar sufiĉe ofte aperas demandoj pri specialaj temoj kiujn nur specialistoj povas

respondi, ofte demandoj pri programpunktoj ktp. Do, oni eĉ devas esti aktoro aŭ komediulo farante ridetan vizaĝon en delikataj aŭ malfacilaj momentoj. Sed atenton, mi ne volas tro nigre pentri mian laboron — ekzistas ofte momentoj kiuj estas belaj kaj karaj — pri kiuj oni volonte memoras. Mi jam dum kelkaj monatoj okupigas pri la gvidado de eksterlandanoj kaj jam havas certan sperton pri la diversaj naciaj kutimoj.

Jam mi akceptis eksterlandan turistan grupon ĉe kiu mi vane serĉis la

interpretiston kiun ili kutime devus kunvenigi. Normale ankaŭ estas kelkaj grupanoj kiuj parolas en mia nacia lingvo minimume kelkajn vortojn — esprimojn, ĉar en la lernejoj ĝi ankaŭ estas instruata. Sed en tiu ĉi grupo komence neniu komprenis min. Esperantisto bedaŭrinde ankaŭ ne partoprenis la grupvojaĝon kvankam ili venis el lando kie la esperantista movado estas sufiĉe forta. Do kio helpis uzi miajn manojn, piedojn kaj la malmultajn esprimojn je kiuj mi memoris lerninte ilin dum mia antaŭ kelkara vizito de ilia lando. Interkomprenigi tiel kaj klarigi al la grupo la interesaĵojn dum la unua tago estas laciga. Dum la dua tago ĝi estas nervojnraba, sed dum la tria tago ĝi estas mortiga. — Mi gvidis la grupon dum 4 tagoj tra mia hejmlando kaj nun ankoraŭ mia spirito povas informi la postrestantan homaron pri miaj travivaĵoj.

La programeroj de la grupo ĉiuj estis bone aranĝitaj — laŭ ebleco — kaj fine ni veturis per trajno al nia sekvinta celo. Dum la vojaĝo mi iomete ripozis pro la antaŭtagaj streĉiĝoj helpe de kafe kiun mi mem kuiris per hungara kafomaŝino turista. Bedaŭrinde nur ke la vaporo kaj la varmo iom makulis

la fenestran tabelon de la kupeo. Kiam mi rimarkis ĝin, la afero bedaŭrinde ne plu estis ŝanĝebla. — Iom refreŝigita mi atingis nian celon kaj post la sekvinta tago la grupo daŭrigis la vojaĝon al sia hejmo.

Post tiu travivaĵo jam pasis kelka tempo. Mi gvidis diversajn aliajn grupojn kaj laste mi gvidis turistojn el la sama eksterlando samprograme kiam mi ne havis tiajn lingvajn malfacilaĵojn. Ŝanĝinte la urbojn ni samtempe ekveturis, sed ni pli frue devis esti ĉe la kajo. Ni uzis trajnon kiu eĉ venis de eksterlando kaj kutime la internaciaj trajnoj dum somera vojaĝsezono ja ĉiam estas plenaj. Temis nun pri kaptado de sidlokoj se ni ne volis stari veturante dum 3 horoj. Do, saltinte en la trajnon post alveno, mi kaptis eĉ liberan kupeon kaj kiam mi ĉirkaŭrigardis ĝin mi trovis varmonmakulitan tableton. Mi bone memoris la antaŭe rakontitan okazin taĵon kaj tuj mi emis trinki kafon. Bedaŭrinde nur ke tio ne eblis, ĉar tiatempe mia kafomaŝino restis hejme kaj restoracivagono ne ekzistis en la trajno.

Ĉu mi sekvontfoje kunportu — aŭ ĉu spirito ne trinkas kafon.

Falangio
(Leipzig)

SVEDA ESPERANTISTA JUNULARA UNUIĜO

La jarkunvenon de SEJU en Skövde ĉ. j. partoprenis 15 gejunuloj. Ĉeestis reprezentantoj el Germanio, ĈSSR kaj Japanio. Okazis ankaŭ oratora konkurso, kies unuan premion gajnis Ingrid Carlsson („La familio“) kaj Franko Luin („Informado“). Programeroj de la jarkunveno: prelegoj, dancvesperoj, ekskurso. . . La nova Estraro de SEJU konsistas el: Ingrid Carlsson — Prezidantino, Franko Luin — Vicprezidanto kaj Redaktoro, Per Sjödin — sekretario kaj Bo Sandellin — kasisto.

En la katalogo, kiun dissendis la eldonejo

„Zeit im Bild

Spenerstraße 21

8019 Dresden

Germana Demokratia Respubliko — Oni skribas, ke estos eldonataj ankaŭ presadoj en Esperanto.

Esperantistoj, bonvolu skribi al la eldonejo viajn opiniojn kaj transsendi samtempe la adresojn de viaj konatuloj, por ke la eldonejo povu sendi al ili sufiĉe frue sciigojn pri siaj Esperanto-eldonaĵoj.

10 INTERNACIA SEMINARIO

de Germana Esperanto-Junularo
Honora Direktoro: Prof. D-ro Ivo Lapenna.

Sekretario: Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, 44 Münster, Germanio, okazos de la 27. XII. 1966 ĝis la 3. I. 1967 en la junulargastejo. La loka universitato havas proksimume 15.000 gestudentojn. Ĝia rektoro estas la Honora Protektanto de la Seminario, kiu traktos la temon: „La mondpercepto de la modernaj natursciencoj“.

Aliĝo ĝis la 15. XII. 1966.

E-LABORBRIGADO

La 18-an de septembro kolektiĝis ĉirkaŭ 20 geesperantistoj, kiuj laboris por la plibeligo de montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa-monto. Ili kolektis ankaŭ lignon por hejtado dum la vintro.

J. Atanasov

Esperanto-grupo de Dreseno nun kunvenadas ĉiujn 19—22 h. en la klubejo de la „Puŝkindomo“.

GDR 8023 Dresden

Alexander Puschkin-Platz 1,
atingebla per tramoj 10, 14 kaj 15.

Gastoj estas ĉiam bonvenaj.

La ĉiusemajna sveda gazeto „Vi“ — eldonkvanto pli ol 500,000 eszempleroj, ĉiam enhavas multajn korespondanconojn de eksterlandanoj. SEJU invitas ankaŭ bulgarajn gejunulojn-esperantistojn sendi siajn korespondanconojn al la gazeto, indikante, ke oni deziras korespondi en Esperanto.

Adreso: „Vi“, Kooperativa förbundet, Stockholm 15, Svedio.

Bo Sandellin

Kunlaboranto de „Juna Esperantisto“

ĈU HISTORIO INTERESAS VIN?

La Internacia Lingvo estas utiligata por kaj pli da celoj tute konkretaj kaj difinitaj. Tamen la fundamenta celo restas plifaciligi la interkomprenadon de la homoj el diversaj lingvo-teritorioj kaj tiel kontribui al la interna kompreno inter la homoj. Evidentas ke unu el la multaj kaŭzoj de malsimpatio kaj malamikeco inter la popoloj estas la historia (mis-)konscio de la homoj. Se la personoj pli bone komprenu la kutimojn, morojn kaj vidpunktojn de aliaj nacioj, nepre necesas diskuti ankaŭ la pasintaĵojn, kiuj estas iuspecaj radikoj de nia nantempa ekzistado; do necesas ke ĉiuj popoloj iom penetru en la historion de aliaj popoloj.

La fakdelegitoj de UEA pri historio — bedaŭrinde nur kvar — interkonsentis fine de januaro 1966 en neformala INTERNACIA HISTORIISTA FAKGRUPO (IHFG) diskuti historion, instruadon pri historio kaj surbaze de re-

ciproka subtenado publikigi historiajn studojn en la Internacia Lingvo. La komence transprenitaj taskoj de la fakgrupo estas: difinado de historiaj nocioj kaj kompilado de terminaro (eventuale en formo de historia leksikono), kompilado de bibliografio pri faŝismo kaj fine preparado de eldonota historiista bulteno kaj eventuale historiistaj kajeroj.

La anoj de la IHFG alvokas ĉiujn personojn, kiuj scipovas la Internacian Lingvon kaj aŭ estas profesiaj historiistoj aŭ hobie okupas sin pri historio (kaj ĝin rilatantaj aferoj) kunlabori, ĉu konstante, ĉu en iu difinita programero. La IHFG-anoj salutas ĉiujn instigojn kaj atentigojn pri terminologiaj problemoj, bibliografiaj indikoj, diskutindaj temoj ktp.

La korespond-adreso de la INTERNACIA HISTORIISTA FAKGRUPO estas: D-ro E. Görlich, Postfach 70, 1094 WIEN, Aŭstrio.



ORGANIZA VIVO

RUSE. La 25-an de julio en Pécs, Hungario, estis subskribita kontrakto pri amikeco kaj konkurado inter la aŭtotransportaj E-societoj en Pécs kaj Ruse. En aŭgusto reprezentantoj de la aŭtotransporta E-societo el Pécs gastis al siaj kolegoj-esperantistoj en Ruse. Dum sia restado ili vidis la rimarkindaĵojn de la bulgara urbo-belulino ĉe Danubo: la aerohaveno, arbara parko „Lipnik“, kelkaj ripozdomoj, vilaĝo Ŝtrâklevo k. a. Ĉie ili estis kore kaj gastame akceptitaj.

La 16-an de aŭgusto okazis la festa renkontiĝo, en kiu oni transdonis la kontraktojn al la reprezentantoj de ambaŭ societoj. Ĉeestis ankaŭ k-do D. Cankov — ĉefingénieur de la aŭtotransporta entrepreno DAP — Ruse.

La bulgaraj kaj hungaraj esperantistoj promesis agadi bone kaj interŝanĝi siajn spertojn.

J. Kalinov

SVIŠTOV. La 5-an de oktobro okazis granda kunveno de studenta E-societo „Aleko“ ĉe la Supera Financa Ekonomia Instituto. Siajn impresojn pri la 22-a kongreso de TEJO en Pécs kaj la 51-a Universala E-Kongreso en Budapeŝto rakontis C. Kolarov, partopreninto en la kongresoj. Pri la laboro de la I-a Internacia Laborbrigado en Târnovo, kie partoprenis ankaŭ niaj kolegoj, parolis V. Vladimitov kaj P. Leĉeva. Oni faris informon pri la partopreno en la II-a Internacia Ferio en Pollando. Oni akceptis 32 novajn membrojn, precipe el la unua kurso. Oni decidis honore al la 30-jara inaŭguro de nia Instituto, kiun oni baldaŭ festos, ke grupo da studentoj faru dutagan ekskurson al „Beklemeto“ en Balkan-montaro proksime de Trojan.

Coĉo Kolarov

prezidanto de SES „Aleko“, Sviŝtov

SILISTRA. En la urbo komenciĝis la nova lernejo. Oni malfermis du E-kursojn — unu en la fabriko por mebloj „Lipa“ kun kursgviganto Leĉo Jalamov kaj la alia en la Sindikata Domo de la kulturo kun kursgviganto Petr Gâlĉavov. La loka esperantistaro faris bonan propagandon pri Esperanto en du mezlernejoj. Oni esperas pri malfermo de E-kursoj en tiuj lernejoj.

L. Jalamov

LA FESTO DE LA ROZOJ EN KAZANLÂK

La 4-an kaj 5-an de junio en Kazanlâk oni festis por unua fojo la Feston de la rozoj. Inter la multaj gastoj estis ankaŭ esperantisto el Hungario, urbo Szenbes, k-do Zsigmond Bacsu. La festprogramo estis bone aranĝita kaj plenumita. Partoprenis ankaŭ la anoj de E-societo „Roza Valo“. Ni organizis ekspozicion, en kiu ni montris al la publiko niajn atingiĝojn. En la mitingo nia gasto Zsigmond Bacsu sur la estrado salutis kazanlâkanojn kaj la gastojn, je la nomo de siaj geurbanoj, ekdeziris plenan sukceson en la konstruado de la socialismo kaj en la batalo por tutmonda paco! Li arde rekomendis, ke nia kara Esperanto estu bona armilo en tiu batalo. La publiko aplaudis la eldirojn de la gasto.

Frumatene je la 5-a de junio la kazanlâkanoj kaj la gastoj vizitis la rozĝardenon de Bulgara Akademio de la Sciencoj apud Kazanlâk, kie junulinaj montris la rozrikoltadon per akompano de popola muziko kaj kantoj. Ĉiuj havis eblecon vidi la produktadon de rozoleo, 1500 specojn de rozfloroj el tuta mondo. Sur la placo de la urba stadiono junulinoj dancis la baleton de la rozfloroj kaj de arteca gimnastiko.

Z.

KARAJ GASTOJ EN RAJEVO KONARE

Invitita de la Distrikta E-Komitato la sekretario de Jugoslavia E-Ligo Dimitrij Bjelanoviĉ el Belgrado kune kun sia edzino vizitis la 13-an de septembro nian vilaĝon. La gastoj estis akompanataj de la prezidanto de D E K Ivan Ŝivarov, la membro de CK de BEA Ivan Bataklijev kaj aliaj esperantistoj el Plovdiv.

La gastojn salutis la komunuma partia sekretario Ivan Dermenski. La prezidanto de la Agrikultura Laborkooperativo Peni Titov informis ilin pri la disvolviĝo kaj sukcesoj de la kooperativo.

La gesamideanoj Bjelanoviĉ kun granda intereso konatiĝis kun la vidindaĵoj de nia vilaĝo. Ili precipe interesiĝis pri la kultura vivo kaj moroj de la vilaĝanoj.

St. Darĵonov



EN PITORESKA TRJAVNA

La 18-an de septembro 17 esperantistoj el Kazanlâk sub la gvido de Genka Minčeva ekskursis al la Balkanmontara urbeto Trjavna. Ni flirtigas verdan standardon, kiu vekas intereson pri Esperanto.

Ĉe la stacidomo nin bonvenigis la prezidanto de E-societo k-do Gânzov, la sekretario k-do Harpov, la estrarano Dimo Dimov kaj aliaj. La renkontiĝo estis tre amika. La publiko aŭskultis nin kaj konvinkiĝis, ke Esperanto estas bona kaj facila lingvo. Ni gastis en la Domo de la bulgaraj poetoj Petko kaj Penčo Slavejkov. Ni vizitis ankaŭ la Domon de Daskalov, rimarkinda bulgara masonisto. Ni vizitis same la Sanatorion por infanoj suferantaj pro osta tuberkulozo.

Posttagmeze ni adiaŭis kaj ĝoje akceptis la promeson de niaj amikoj, ke ili vizitos la junularan balon kaj festivalon, kiu okazos en Kazanlâk en aprilo 1967.

Z.

BURGAS. Je la 23-a de septembro j. k. E-societo „Nigra Maro“ kune kun la Kultura Domo „Probuda“ organizis publikan prelegon je temo: „50-a UK de Esperanto en Tokio, Japanio (Tra Siberio al Japanio)“. En plenplena salono Neli Abaĝieva rakontis siajn impresojn pri Japanio dank' al Esperanto.

Pli ol unu horon ŝi parolis kaj kiam ŝi finis, longan tempon oni ne ĉesigis la aplaŭdodon.

Multaj urbanoj esprimis al la prelegantino siajn impresojn pri la bona prelego.

N. Abaĝieva estis invitita de la Kultura Domo „Far“ denove veni kaj prelegi je la sama temo.

Neli Abaĝieva prelegis aparte ankaŭ en tri lernejoj.

K. Limonov

La 23-an de septembro 1966 pro aŭtobusakcidento mortis en Ruse

NADEJDA DIM. IVANOVA

el Loveĉ, 62-jara, edzino de la konata esperantisto Dim. Ivanov.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

ОКРЪЖЕН НАРОДЕН СЪБЕТ

Отдел „Народна просвета“

№ IV-7234

16. IX. 1966 год.

гр. РУСЕ

До Директора на

гр. (с.)

РУСЕНСКИ ОКРЪГ

Известно е, че международният език есперанто се яви като средство за сближение и разбирателство между отделните народи от всички континенти, за укрепване на мира в света.

Неговото практическо приложение в живота се ползува от широк кръг хора както в чужбина, така и у нас.

Имайки предвид повишения интерес към изучаване на есперанто най-вече сред учащите се и учителите, препоръчваме Ви да окажете съдействие за неговото изучаване в кръжоци, съгласно Примерната програма, издадена от Министерството на народната просвета.

За подготовка на ръководители за кръжоците окръжният отдел „Народна просвета“ съвместно с Окръжния комитет на Съюза на учителите и Окръжния есперантски комитет организира тримесечен безплатен курс, занятията на който ще започнат на 23 октомври т. г. и ще се водят всеки неделен ден от 10—12 часа в Учителския дом на културата на „Славянска“ № 1, Русе.

В срок до 15 октомври изпратете списък в Учителския дом на културата, ул. „Славянска“ № 1, Русе, на желаещите да посещават курса.

Н-к отдел „Народна просвета“:

Йорд. Саманджиев

Учителски дом на културата:

Директор Е. Еневски

Председател на ОК на СБУ:

А. Атанасов

Окръжен есперантски комитет:

Хр. Христов



GRAVA KULTURA EVENTO EN KAZANLÂK

La 3-an de oktobro ĉi-jare en Kazanlâk oni celebris la 65-jaran datrevenon de la fondiĝo de arkeologia muzeo „Iskra“ („Fajrero“) kaj centjaran datrevenon de la naskiĝo de ĝia fondinto Petr Iv. Topuzov. La muzeo estas nacia fiero laŭ sia riĉeco. Ĝi estas di-



P. Topuzov Skizo fare de lia nepo D. Mirĉev

stingita kiel Nacia superulo por 1956-a jaro ĝis nun seninterrompe. En 1962 ĝi ricevis la altrangan ordenon „Kiril kaj Metodij“ — unua grado. Ĝi estas modelo de multjara agado en la kampo de la arkeologio, la artoj, de la heroaj bataloj kontraŭ la faŝismo. En kvar haloj estas aranĝitaj 40,000 p'ej diversaj objektoj. La 20-an de junio 1901 j. Petr Tupuzov per la tiama primitiva urba servo por diskonigo de anoncoj invitas la geurbanojn viziti kaj vidi la plej novan kulturan fenomenon — muzeon „Iskra“. Ili respondas el tuta koro al la anonco.

Kion prezentas al la publiko muzeo „Iskra“?

En la enirejo vin renkontas vestoj kaj objektoj el la vivo de kazanlâkanoj

antaŭ nia liberiĝo el la turka jugo. En tri vitrinoj vi vidas la vivon de la prahomo. En alia halo vi vidas restaĵojn de tracoj, romianoj, slavoj kaj bulgaroj. Grandan intereson vekas la skizo de la famekonata traca tombejo. En tiu halo estas bonege prezentita ankaŭ la mezepoko. En alia halo estas prezentitaj la epoko de la turka jugo, bataloj kontraŭ la turkoj, armiloj, vestoj, dokumentoj, mapoj, bidoj de eminentaj rusaj pentristoj kiel Repin, Ajvazovskij k. a. Vi vidos ankaŭ elmontraĵojn, kiuj rakontas al vi pri la bataloj de nuntempaj bulgaroj kontraŭ la faŝismo. Vin renkontos la okuloj de multaj batalantoj-esperantistoj: Bonĉo Ŝanov, generalo Cvjatko Radojnov, Petr Dimov Jonkov, Nedelĉo Karaivanov, Kunĉo Kunev, Denju Ivanov Tribunĉika! Sed la publiko ne konas tiujn batalantojn, ke ili estis sindonaj esperantistoj. Oni devas fari ion per kio la publiko eksciu, ke ili estis esperantistoj.

En speciala halo estas ekspoziciataj pentraĵoj kaj skulptaĵoj de talentaj kazanlâkanoj kiel Zaharij Jelev, Ivan Penkov, St. Stamatov, K. Tringov, Nenko Bakanski, Ivan Mandov. Ĉudomir, Mara Ĉorbaĝijska k. a. En la galerio troviĝas bildoj de Ivan Mârkvicka, Anton Mitov, Nikola Marinov k. a.

Proksime de Kazanlâk troviĝas la antikva traca urbo Sevtopolis, ma kovrita dum la konstruado de baraĵlago „Georgi Dimitrov“. Pri ĝiaj arkeologiaj fosaĵoj respondecas la muzeaj laboristoj en muzeo „Iskra“.

Riĉa kaj varia estas la historio de la Valo de la Rozoj. Ŝipka, Ŝejnovo, Stoktov — sanktaj lokoj por la bulgara popolo. Ilia gardanto estas muzeo „Iskra“.

Krom la tre simpatia fondinto de la muzeo Petr Topuzov, atenton meritas ankaŭ lia posteulo Dimitr Ĉorbaĝijski — Ĉudomir, konata verkisto, pentristo, longjara direktoro de la muzeo „Iskra“ kaj talenta arkeologia laboristo!

Iv. Zahariev



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Mi deziras interŝanĝi folkloraĵojn pri naciaj kostumoj el la tuta mondo kontraŭ poŝtkartoj kun naciaj bulgaraj kostumoj. Adreso: Sofia, str. Parĉeviĉ 28, per Dimitro Anastasov por Marina Kalĉeva.

D-ino Rajna Joveva, dentkuracistino, str. Feliks Kanic 44, Sofia — kun sam-profesiaĵoj el la tuta mondo.

Nikola Petrov Nikolov (29-jara, edziĝinta, konstrua laboristo), str. General Skobelev 41, Ŝumen — kun ĉiuj landoj pri historio kaj literaturo. Respondo garantiata.

Angel K. Angelov, Beli Iskâr 13, Sofia — kun Anglio kaj Aŭstrio pri IPK.

FINNLANDO

Storm Lauri, Luutnantintie 9, Turku 5 — kun bulgaraj esperantistoj el urbo Varna.

HUNGARIO

József Kátay (12-jara knabo), Budapest XXI, (Csepel) mans. u. 2 — interŝ. PM kaj filmrevuojn kun esperantistoj el ĉiuj landoj.

POLLANDO

Alojzy Gorczykowski, str. Gen. Pradzyńskiego 1-a/16, Wrocław — 20-jara studento — kun bulgaroj pri ĉt.

USSR

Lernantoj de la okjara lernejo (11—14-jaraj) deziras korespondi esperantlingve pri diversaj temoj kaj interŝanĝi PK, PM, fotojn. Adreso: Omskaja obl., Uŝakovo, Al Ŝkola.

Tonja Belousova (16-jara), ul. Obŝkaja 12, selo Aleksandrovskoje, Tomŝkaja obl.

Anatolij Ivasenko, pereulo Sverdlova 4, Gorjaĉij Kljuĉ, Krasnodarskij kraj — kun ĉl pri ĉt, interŝ. PK, monerojn.

30 gelernantoj de 4—8-a klasoj deziras korespondi kun ĉl; interŝ. BK. Skribu al adreso: Esperanto Burelis, 8-té mokykla, Pasvalys, Litovio.

S-ino Vila Pent, Tallinn, Killustiku 7—11, Estonio — kun ĉl pri dancoj, interŝ. PK, fotojn.

S-ro Guido Täth, Tallinn, Käsperti 30—2, Estonio — pri filatelio kaj lia filino Merike (10-jara) kun infanoj el tuta mondo.

S-ro Avo Suurmets (24-jara), studento de Pedagogia Instituto, Mooste s.-jks., Põlva rajoon, Estonio — pri ĉt. interŝ. PK, fotojn kun ĉl, precipe el Afriko kaj Latina Ameriko.

S-ro Julio Karmin, Tapa, Lillaka 34, Estonio — kun ĉasistoj el tuta mondo pri defendo kaj nutrado de ĉasbestoj.

S-ino Marta Kronk-Huik, Tallinn 6, Ristiku 15—2, Estonio — serĉas siajn antaŭmilitajn gekorespondantojn.

F-ino Anne Lahe (10-jara), Tallinn 7, Tisleri 6—2, Estonio — kun gejunuloj pri radiotekniko, fotoj, lingvoj.

Esperanto-sekcio en Tallinn aranĝos letervesperon en aprilo 1967 j. por novaj kursfinantoj. Skribu amase al: Johannes Palu (vicprezidanto), Tallinn 16, Sõlme 21, Estonio.

Je la 24-a de novembro 1966 pro aviadila akcidento apud urbo Bratislava, Ĉeĥoslovakio, mortis malproksime de sia patrolando la neforgeseblaj batalantoj por paco kaj amikeco inter la popoloj la esperantistoj

**AKADEMIANO IGNAT
EMANUILOV kaj**

VIOLINA STOICĜOVA.

stevardino en la aviadilo, 19-jara junulino, multesperiga esperantistino.

Niajn sincerajn kondolencojn al la funebrantaj familioj.



БЪЛГАРСКИЯТ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ И БЪЛГАРСКАТА ЕСПЕРАНТСКА КООПЕРАЦИЯ ви канят в **ДРУЖЕВО** през лятото на 1967 година!

Мнозина може би ще попитат: — Какво е Дружево? Къде се то намира?

— Дружево е малко село, разположено на Дружевската (Дупнивръшката) седловина, която свързва Берковската планина с Врачанската, недалеч от шосето Лакатник—Вършец.

— Какво има в това село?

— Близко до него се намира *летният учебен лагер на българската есперантска кооперация*.

— От кога съществува лагерът?

— В края на 1959 г. селото подари на кооперацията около 100 декара земя върху слънчев склон на седловината.

— Какви са битовите условия в лагера?

— През 1961 г. бяха построени жилищното помещение и кухнята. През 1965 г. лагерът се електрифицира, докара се бистра планинска вода в двора и в кухнята. Жилищното помещение се обзаведе с пружинени легла, одеала, чаршафи и всичко необходимо. Курсистите сами разшириха електрическата мрежа и подариха на лагера радиоапарат.

— През 1966 г. курсистите допринесоха ли за подобряването на лагера?

— Те разшириха и подобриха електрическата мрежа и подариха на лагера електрически грамофон с високоговорител.

— Има ли в лагера есперантска библиотека?

— Да. Тя се обогатява постоянно. През 1967 г. в нея ще има около 200 книги.

— Кога се провеждат курсовете?

— През 1965 г. имаше две смени, през 1966 г. — три, през 1967 г. ще бъдат четири:

1. За начеващи — 18 юни — 2 юли — преподавател *С. Хесанчиев*.

2. За напреднали — 5—19 юли — преподавател *С. Хесанчиев*.

3. За преподаватели — 22 юли — 5 август — преподавател *С. Хесанчиев*.

4. За начеващи — 8—22 август — преподаватели *К. Вълев* и *Ив. Цанев*.

— Колко се плаща за една смяна?

— За храна се плаща 1.10 лв. на ден (само продуктите), за спане 20 ст., а за курса (55 учебни часа) 5.50 лв.

— При такива цени могат ли курсовете да се издържат?

— С тези приходи курсовете не ще могат да се издържат. Затова *Българската есперантска кооперация ги подпомага парично*.

— Интересно е да се знаят преценките на другари, които са били в лагера.

— Такива преценки направиха другарите *Симеон Мирчев Паунов*, от *Перник*, *Дачо Динев Тонев* от *Раднево*, *Мария Пигева* от *Смолян*, които посетиха лагера за пръв път през 1965 г., а през 1966 г. дойдоха за втори път, *Марин Десков* (председател на есперантското д-во в *Кубрат*), *Георги П. Георгиев* от *Тервел*, *Георги Ст. Петров* от *София*, *Ив. Шойков* от *Угърчин*, сем. *Филови* от *Мърводол* (*Кюстендилско*), сем. *Дилови* от *Мездра*, *Соня Сутрова* от *Русе* и други. Всички са доволни от лагера и от курсовете.

Довиждане, другари, в Дружево през лятото на 1967 г.

БЪЛГАРСКА ЕСПЕРАНТСКА КООПЕРАЦИЯ

София, бул. „Витоша“ № 40 — Тел. 7-89-08 —
Банк. с/ка 17/44, БНБ 1/104

КАТАЛОГ

на есперантска литература и помагала, с които разполага кооперацията

1. — Учебник по есперанто от Ив. Сарафов и С. Хесапчиев . . . 0.45 лв.
2. — Учебник по есперанто за напреднали от Ат. Д. Атанасов . 0.30 „
3. — Учебник по есперанто за напреднали от К. Вълев 0.80 „
4. — Методика на обучението по есперанто от Ив. Сарафов . . 1.20 „
5. — Dialogaro (Есперантски разговорник) от П. Цолов 1. „
6. — Есперантско-български речник — съставен от колектив 2.31 „
7. — Българско-есперантски речник — съставен от колектив . . 3.14 „
8. — Училището, учителството и международният език — превел
Иван Сарафов 0.16 „
9. — Glumarkoj — 100 броя 0.20 „
10. — Glumarkoj — (карта България) — 84 броя 0.42 „
11. — Sub la jugo — от Ив. Вазов, прев. колектив 1.73 „
12. — Bofilino — от Г. Караславов, прев. Сим. и Ас. Симеонови 1.33 „
13. — Elektitaj versaĵoj — от Н. Вапцаров, прев. колектив 0.67 „
14. — Vagabondoj (Немили-недраги) и 4 разказа от Ив. Вазов, прев.
Ив. Ковачев 0.52 „
15. — Aŭia Ameriko — от Св. Минков, прев. Г. Хършев 0.40 „
16. — En konkurado kun la tempo от Сп. Русинов, прев. Ив. Ко-
вачев и Ив. Керемедчиев 1.05 „
17. — Ili pereis por la libero 0.10 „
18. — Tra la ventego от Хр. Смирненски 0.36 „
19. — La faraono — romano de B. Prus en 3 volumoj, trad. Kabe 6. „
20. — Mistero Minora — orig. novelo de F. Szilágyi 2.40 „
21. — Homoj kaj riveroj — orig. rakontoj de Roscbah 2.40 „
22. — Geedzoj AFU de To Hoai 0.35 „
23. — Senelirejo — romano de N. K. Hoan, trad. kolektivo 0.50 „
24. — Medalionoj de Z. Nalkowska, trad. T. Hodakowski 1. „
25. — Noveloj de LU SIN, trad. kolektivo 2.70 „
26. — Ĉina antologio — trad. kolektivo 2.80 „
27. — Komunista manifesto de K. Marx & F. Engels 0.40 „
28. — Sinjoro Tadeo de Adam Mickiewicz, trad. A. Grabowski . . . 3.54 „
29. — Kiamaniere distingi la fungojn 0.40 „

Поръчки под 3 лв. не се изпълняват. Към съответната сума се прибавя и 10% за пощ. разноски. Изпращайте суми само чрез ПОЩЕНСКИ ЗАПИС. Уведомявайте писмено за поръчката. Кооперацията не работи с наложен платеж.

